— laŭ ĉinesko Siyuanren (Sopiro pri fora homo)

Ekster ĉies atendo,/ via foriro

tro subita/ vundas nin per/ sanga korŝiro!

Funebbras panegiro,

pia admiro.

pri vi eterne/ daŭros nia/ verda sopiro!

2009-12-03

<091>

Ĉina <Listo de Schindler>

— Laŭ ĉinesko Siyuanren (2008-03-31)



Kiel <Listo de Schindler>:

Devo de viro!

Raportisto

en milito.

Nobla inspiro.

**Mil lioj da trans-iro.
Venko-akiro.
Sur monumento
ĝis hodiaŭ
kor-panegiro!**

Sumuzhe

(Virina Ĉapo)

§.51 Sumuzhe 苏幕遮 Virina Ĉapo [2-62-8]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 7 versoj de 33, 45, 7,45

silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a,xa (x= senrima)


<092>

Aŭtune

— laŭ ĉinesko Sumuze

**Nubiĝa
ĉielo.
Sub senĉesa
ventblova pelo,
folioj en pelmelo
falas. Flave
kovrita tero.**

**Aŭtun' sur
rivero**



**kunfandiĝas
kun ondŝancelo.
En form' de V-litero
flugas grup' de
sovaĝansero.**

Suzhongqing (Kora Sento)

§.52 Suzhongqing 诉衷情 Kora Sento [2-44-6]

ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de
7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa
(x=senrima)

<093>

Akrostiko FABINA

— laŭ ĉinesko Shuzhongqing (kora sento)
(2009-07-11)

Fervoro speciala
ankaŭ morala
brilas sur vizaĝo/ via ovala
impresas/ batala
normala
antaŭen al/ nobla celo/ ideala !

<093-2>

§. lily 2006-12-6 22:13:57

Duŝo 淋浴

— laŭ ĉinesko Suzhongqing 调寄《诉衷情》

nuda korpo sub duŝo 淋浴器下裸露身

kun ruĝa buŝo 佳人红绛唇

mi lavas min zorge 自我仔细冲洗

kun mana tuŝo 纤手涤埃尘

lavitas 污垢尽

kulp-guŝo 过失混

pens-fuŝo 乱思清

ĝis la haŭto 直到肌肤

kaj senspure 如玉沐水

per akv-puŝo 无瑕真纯



世界语诞生之初，大师们用它来世译各国的经典名著，以此证明吾语具有足够胜任的表达力。

但世界语原创作品的地位又靠什么来显示呢？一直到有世界语的优秀作品，被人译为不同的民族语，这也是一个尺度，一个

里程碑。

我们创作 ĉineskoj, 从渊源流长的中国古代文化吸取营养, 取其诗意, 用世界语来直接表达, 这当然是一个主要的阶段。而到了一定的时候, 原创的 ĉinesko 又被人译为汉语, 岂不是标志着可喜的飞跃呢? 所以国柱试译了这首诗。作者的名字我并不知道, 是据 lily 斗胆音译的。敬请各位网友指正。

Taichangyin

(Umeo antaŭ vintro)

§.53 Taichangyin 太常引 Umeo antaŭ Vintro [2-49-7]

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 5 kaj 6 versoj respektive de 7,5,5,34/445,5,34 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa/ xxa,a,xa (x=senrima).

<094>

Sur neĝa rivero

— laŭ ĉinesko Taichangyin

En la vintra naturo

nek birda spuro,

nek hom-veturo.

Nur dika/ neĝ' sur ruro.

Okulfrapas/ tamen sola/ fiŝist-figuro,

kvazaŭ gravuro,

en blanko/ sen mezuro.



Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

§.54 Tasuoxing 踏莎行 Pasxo sur Herbo [2-58-6]

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 44,7,77 silaboj,

laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)

<095>

Konsole

— laŭ ĉinesko Tasuoxing

Ĉu atakis/ vin la sento

dum la vespersilento

ke estas vi en solo/ en surda sol-turmento?

Ho, ne plendu/ pri l' momento

kiam la nokt' per mento

incensas, kaj aspergas

la luno per arĝento.

Taoyuan Yiguren

(Sopiro pri malnova amiko)

§.55 Taoyuan Yiguren 桃园忆故人 Sapiro pri malnova amiko
[2-48-8]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 4 versoj kun 7,6,6,5 silaboj
respektive, kun kontinua rimo.

<096>

Renkonte al la Tigra Jaro

— laŭ ĉinesko Taoyuan Yiguren
(2010-01-09)

**Forpasis jaro Bova.
Venas jaro nova
de Tigro reĝpova,
sukceso-kova.**

**Nia trupo elprova
ek al marŝo mova
sub verdflogo blova
kun ĝoj' surbrova!**



Tianjinsha (Pura Sablo)

§.56 Tianjinsha 天净沙 Pura Sablo [1-28-5]

ĉina fiksfirma poemo el 5 versoj de 6,6,6,4,6 silaboj kun kontinua
rimo.

<097>

URBA MIRAĜO

— laŭ ĉinesko Tianjinsha
(2009-12-03)

**Urbo en miraĝo!
Flugas nuba naĝo
horde en adaĝo.
Sur etaĝo
mirinda pejzaĝo!**



Matene en 2009-12-03,
aperis rara horizontale fluganta nebulo en urbo Wuhan. La
tuta urbo kvazaŭ dronis en miraĝo. Loĝantoj en pli ol 20-a
etaĝo de domo ĝuis tiun sorĉan pejzaĝon.

Tianxianzi (Fea Kanto)

§.57 Tianxianzi 天仙子 Fea Kanto [1-34-5]

ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 7,7,73,3,7 silaboj, laŭ
rimaranĝo a,a,xa,a,a (x=senrima)

<098>

Al Cindy

— laŭ ĉinesko Tianxianzi
(2009-11-16)

**Vi diris ke komence
ĉineskis sen-intence.**



**Sed destino repagas
sentence
potence
vin glori rekompence.**

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

§.58 Tiaoxiaoling 调笑令 Flirta Kanto [1-32-6]

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

ĈINESKE

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

<099> I

**Kara, kara
amatin' florfara!
Lip' ĉe lip' intimi,
dum kor' ĉe kor' rimi.
Miri, miri,
kio pli inspiri?**

<100> II

**Granda, granda
pekin-anas' frandan;
al gasto honora
invito plej mora.**



**Arom', arom'
veka al gastronom'!**

<101> III

**Fia, fia
negoc" sensacia.
Korupto al homo,
skandalo al nomo.
Mono, mono,
fonto de malbono!**

<102>

SENTITOLE

**Fia, fia
diboĉ' senracia,
volupto furora,
epidemi' mora,
amor', amor'
kanibala devor'!**

VOKOJ

1999-05-08, informiĝinte ke kvin misiloj de NATO atakis la ?inan ambasadorejon en Jugoslavio.

<103>

1

Paco, paco
Sub bomba minaco !
Nun buças mortdona
Misil' Vașintona.
NATO, NATO,
Venigant' de fato !

<104>

2

Aêce, aêce
Bombadi sovaêge !
Event' katastrofa,
Sanga șuldo nova.
Vano, vano -
Murdoj far Satano !

<105>

Lito

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

Lito, lito,
al ripoz' invito.
Dormu dolĉe, bone,
belsonĝu festone!
Nesto, nesto,
de ora tempresto

<106>



Nupta Lito

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

**Nesto, nesto,
fokus' en nuptfesto,
por amore foli
kaj gee petoli.
Lito, lito,
eden' de koito.**

<107>

Misa Komedio

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

**Fama, fama
malĉastej' reklama,
sur kovrilo loki,
vekas homojn moki.
Kio, kio?
Misa komedio.**

调笑令 • 尴尬喜剧

谁料，谁料，
色情行业广告，
登上封面醒目。



汉学家认识不？
不识，不识，
喜剧尴尬匪夷。

<108>

Malĉipa Pugo

— laŭ ĉinesko Flirta Kanto

(2007-12-05)

**Pugo, pugo,
eĉ en ofic-flugo
ankaŭ rangojn havi
ne forgesis pavi.
Vipa, vipa
draŝ' al luks' malĉipa.**

调笑令·公仆屁股

(2007-12-05)

屁股，屁股，
只因属于公仆，
哪怕短暂出差，
不忘官架谱摆。
摆谱，摆谱，
岂是“为民服务”？

<109>

Struto

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

**Struto, struto,
mokinda konduto.
Kapon malsincere
kaŝas ĝi subtere.
Rete, rete,
malkovri komplete.**

调笑令·驼鸟

驼鸟，驼鸟，
行为真是可笑。
埋头地里掩藏，
心虚不链上网。
网上，网上，
丑陋全都曝光。

<110><111>

Jubile' centjara

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling
(2009-12-07)

**Kara, kara
Jubile' centjara,
pro malverda koro
droni en ignoro.
Oro, oro,
pli nova furoro?**

**Kara, kara
Jubile' centjara,
kial en ignoro?
Veas mia koro.
Roko, roko
flegma por alvoko.**

<112>

La Novjara Mesaĝo 2010

de la Prezidanto de UEA

(2010-01-01)

**Nova, nova
projekto elŝova.
Kuntosto konjaka,
Orientigtraka.
Kara, kara
mesaĝo novjara!**

Wanghaichao

(Rigardo al Martajdo)

§.59 Wanghaichao 望海潮 Rigardo al Martajdo [2-107-11]
ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 446,
446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,
xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)
<113>

Akrostika rimgratulo al

BORIS KOLKER

— laŭ ĉinesko Wanghaichao (Rigardo al Martajdo)

Boris Kolker/ ĉiĉeronas/ kun granda fervoro
Ofte per la/ VOJAĜ-libro/ fama en furoro —
Rara trezoro!
Indas aklamoj/ al aŭtoro.
Sepdek jaroj/ da fruktdona laboro

Kondukas al gloro.
Okaze de la/ festa horo,
Li merite/ gravuriĝas/ en nia memoro.
Kara mentoro,
Eternan sanon!/ kun favoro
Rimgratulas/ vin ĉina verda koro.



<114>

Guozhu kaj Lu Jixin :

Rigardante Martajdon

— Leginte la novlibron "Trans Maro..." de Lidia

八载苦闷 **Decidinte:**

一言难尽 **per luktado**

决意换种活法 **tra viva rikan' do.**

纵有艰辛 **Senlabore**

义无反顾 **vi eliris**

下岗暂离中华 **de la hejmolando.**

独自闯天涯 **Sola vadanto**

怀崇高理想 **kun idealo.**
人类一家 **Verdaj plandoj**
凭世界语，绿踪 **spuris tra Eŭropo**
行遍，欧罗巴 **per Esperanto.**

游记结集堪夸 **Not' kun eleganto:**
写荷兰风情 **Vent' muelil' en**
危楼倾斜 **Nederlando,**
波兰授拳 **kaj internacia**
捷克盛会 **familio**
国际家庭考查 **en Pollando,**
并巴哈欧拉 **Bahaismgrando,**
凯旋门情思 **Germana aŭto,**
德国租车 **Franca frando...**
莉迪亚《海那边.....》 **Lidia Trans Maro**
文坛绽奇葩— **rara girlando !**

En junio 1998, kadre de la 3a Somera Seminario de HEA/ILEI/EVA, okazis la inaŭgura distribuado de la libro "Trans Maro..." de Lidia. Guozhu versis poemon en la ĉina kaj Lu Jixin tuj esperantigis ĝin. Do, pri la sama enhavo samtempe kreigis dulingvaj versioj ambaŭ en la sama fiksforma ĉinesko Wanghaichao. Nun ni aperigis ilin paralele, por ke niaj karaj legantoj aprecu la raran specimenon. Ordinare la nomo de la ĉinesko ne aludas pri la enhavo. Tamen oni ankaŭ ne malpermesas ke ĝi iel aŭ iom aludas.

Xiangjianhuan

(Ĝojo de Intervidiĝo)

§.60 Xiangjianhuan 相见欢 Ĝojo de Intervidiĝo [2-36-7] |

alinome: Wuyeti 乌夜啼 (Nokta Krio de Korvo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj
respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo aaa / bb,aa
<115>

Disiĝbedaŭro

— laŭ ĉinesko Xiangjianhuan

Sen vort'. Tur-ascendo.

Krescento.

Aŭtun' ŝlosiĝas per silento.



**Enkorta
senvorta
turmento---
disiĝbedaŭra violento!**

【原作者】: 李煜

无言独上西楼，月如钩。
寂寞梧桐深院锁清秋。
剪不断，理还乱，是离愁。
别是一般滋味在心头。

<116>

Guozhu:

La Unua Simpozio pri Ĉinesko

— laŭ ĉinesko Ĝoĵa Intervidiĝo 相见欢

(2007-12-09)

**Solenejo hela
kaj bela.
Kunsido sub flago verdstela.**

**Kun koro,
adaro
fidela,
nova marŝo sub gvido cela.**



Veĵda, Sceto kaj Guozhu en la Unua Simpozio de Ĉinesko
<117>

§ .60-03

Funebre al Kara Jariĉ

— Laŭ ĉinesko Wuyeti

Forpas' pionira.

Ĉes' spira.

Nin vundis nekrolog' rapira.

Tenebro.

Funebro

Korŝira.

Eternas memor' vin sopira !

Xiaochongshan (Malgranda Montvico)

§.61 Xiaochongshan 小重山 Malgranda Montvico [2-58-8]
ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7, 53,7,35
/5,53,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa (x=senrima)
<118>

Donaca Problemo

— laŭ ĉinesko Xiaochongshan

Sed donac' de la gemo

Jam tuj fariĝis

Problemo.

Plaĉas ĉiujn la temo,

Precipe

Bild' pri haremo.

Ĉineska kremo,

Erotikversa

Legemo

Rekordkrea poemo,

Aŭtoron

Ĝenas dilemo.

Legu

<043>

Fine aperis Oвра Burĝono

Xiaomeihua

(Malgranda Umefloro)

§.62 Xiaomeihua 小梅花 [2-114-22]

ĉina fiksforma poemo eldu strofoj po 11 versoj de
3,3,7;3,3,9;/7,7;3,3,9 silaboj, laŭ rimaranĝo aaa bbb cc ddd.

<119>

Admire

— laŭ ĉinesko Xiaomeihua (eta umefloro)

Ho, surpriz'!

Versa briz',

ĉarmas via improviz'.

Verda gem',

arta krem',

al mi tre plaĉas via poem'!

"Transformigu ni per sprit'

skem-katenon rekvizit'."

Asertprav'!

Rim', enhav'

plus form' kondukas al plena rav'.

Sanktpromes'

por sukces',

ni kultivu ĝin sen ĉes'.

Freŝa frond',

**nova ond',
facila vento tra l' tuta mond'!
Kun prudenta devkonsci'
nian sulkon fusu ni!
Kontribu'--
granda ĝu'.
Ni do ĉinesku ankoraŭ plu!**

Xiaoxiangshen (Feino de Hunan)

§.63 Xiaoxiangshen 潇湘神 Feino de Hunan [1-27-3] |

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 3,3*,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo aAaxa (x=senrima).

<120>

CENTJARA DUOPO

— laŭ ĉinesko Xiaoxiangshen

**Duopo,
Duopo,
glor' ne nur de Eŭropo,
sed ankaŭ de l' tutmondo,
malgraŭ tempa galopo.**

Xiechichun (Printempo ĉe lago)

§.64 Xiechichun 谢池春 Printempo ĉe Lago [2-66-8]

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 8 versoj de 46,34,45,34 silaboj, kun duona rimo.

<121>

La Okcidenta Rojo

— laŭ ĉinesko Xiechichun

Verdaj herboj/ kreskas kvazaŭ mola

tapiŝo/ plurtavola./

Aŭdiĝas el/ profund' grapola

la kanto/ oriola.

Je vespero/ kun pluvo petola

ludiĝas/ tajdo bola.

Kuŝas vaka/ ĉe pramej'abola

boato/ nun izola

春潮帶雨晚來急，野渡無人舟自橫。

Xijiangyue

(Luno super Okcidenta Rivero)

§.65 Xijiangyue 西江月 Luno super Okcidenta Rivero [2-50-6]

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ

rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

<122>

AGRABLA VESPERO

— laŭ ĉinesko Xijiangyue

Riz-aroma ruo.

Riĉ-rikolta belo.

Kvakbruo ĉe orelo.

Agrabla vespero.

**Du aŭ tri bolidoj
strekis tra l' ĉielo.**

Post arbar' ekrivelo:

Pont' super rivero.



Yanermei (Ĉarma Okulumo)

§.66 Yanermei 眼儿媚 Ĉarma Okulumo [2-48-5]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj de 5 versoj de 7,5, 444 / 75,444
silaboj, laŭ rimarangô a,a,xxa / xa,xxa (x=senrima)


<123>

Ĉarma Okulumo

— laŭ ĉinesko Yanermei

**Ĉe ŝia sinturniĝo---
vera ĉarmriĉo.**

**Ameme ŝi
okulumas**



pro feliĉo.

**Ho, mi preskaŭ svenis ĝis
rava vertiĝo.**

**Mi tagnokte
ŝin aprecas
sen sufiĉo.**

Yejinmen (Vizito al Ora Pordo)

§.67 Yejinmen 谒金门 Vizito al Ora Pordo [2-45-8]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 4 versoj de 3,6,7,5/6,6,7,5
silaboj, kun kontinua rimo.

<124>

Se la vivo trompas

— laŭ ĉinesko Yejinmen

**Pia kor'
ne dronu en dolor'
pro la sorta malfavor'
pro fia ignor'.**

**Se la vivo-rigor'
vin trompas per vundbor',
kredu: kio pasis for,
fariĝos trezor'.**

Yexingchuan

(Nokta Ŝipvojaĝo)

§.68 Yexingchuan 夜行船 Nokta ŝipveturo [2-56-6]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,34,446 silaboj,

laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

<125>

Nokta Veturo

— laŭ ĉinesko Yexingchuan (Nokta ŝipveturo)

Ventas. Nokta tenero.

Soleca

ŝip' kun velo.

Dum lunlumo

fluas onde

en granda rivero.

Super la vasta tero

pendas mil

brilaj steloj.

Mi similas

al mev' inter

tero kaj ĉielo.



Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

§.69 Yijiangnan 忆江南 Sopir-al-Sudo [1-27-3]

Ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

<126><143>

Guozhu (1938-)

Prov' primitiva, prov' kreiva

— La unuaj 17 ĉineskoj Yijiangnan(Sopir-al-Sudo)

Arkivo/ pri prov' kultiva/ antaŭ tridek kvar jaroj./ Ĉu iom primitiva? /Jes, kaj kreiva.

1. Petaloj falas senbrue en ĝarden'. Trans kurteno pluvadas kontinue kaj silke blue. (1973-01-03)
2. Ĉu fajro sovaĝa povas forleki herbojn? Ho ne! Jen vent' printempa blovas, kaj herb' jam novas! (1973-01-03)
3. Suferis ĉiam turmente patriot'. Dum filistroj vivon ĝuis kontente, indifere.
4. Post pluvo ĉu begonio restas la sama? Sciu! nun grasas nur folio, krome nenio.
5. Kamparon kisas ĉielo, kaj ĉarma luno tentas boaton en rivero per sorĉa belo.
6. En kolzojn kaŝe evitas jen flava papilio. Fulme knab' alrapididas--- ĝin jam ne vidas!
7. Lumigu! ke mi refoje konstatu: Ĉu ni vere revidas nin, aŭ foje nur songas ĝoje?

8. Nenio en sonĝ' min bridas: Trans pont' jen mi denove al via dom' vizitas, serene ridas.
9. Ascendas mi nur silente sur pavilonon, kie saturas lun' arĝente svelta krescente.
10. Karese, hirundoj vekas. Ĉe lag' jen persikfloroj jam ehxe flori ekas kaj onden lekas.
11. Se vi sur Lushan vin trovas, certe vi l' monton, kies pejzaĝ' senĉese novas, koni ne povas.
12. Al dandoj malsat' ne ĝenas dum al viv' de kleruloj ĉiam suferoj venas, mizeroj plenas.
13. En pluvet' dorse sur azen' veturante la poet' lulis sin per rava tem' taŭga por poem'. (1973-01-10)
14. Suferis ja preskaŭ ĉiam de amsopir' turmentojn. Sed ĉu mi havus iam penton? Neniam!
15. Kiam vent' taŭze flirtas kun nuboj, super Fen-river' ĉiam pli forflugas nun ostarde en aŭtun'.(1973-01-12)
16. Dancas jen kirle ĉe Yanshan mate grandaj la tumulte en ocean' de frosturagan'.
17. Ĉielo kiel volb' pendas super step'. El ŝafaro ekprezentas sin, kiam ventas. (1973-01-19)

<144>

Trioje Berilas

**Trioje
jubileuloj
sur paĝo de Penseo
berilas kun stimuloj**

benate de gratuloj

(2003-07-09)

<145>

Ĉinoj Revenas

— laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo

Sendube

rekordon tenas

la Uhana Kolokvo.

Aŭdu : aklam' ĝojplenas :

" Ĉinoj revenas !"



Dum la jardeko de Kultura Revolucio ĉina EM fariĝis neaŭdebla. Tial, la raporto pri la Uhana Kolokvo, kiu okazis, samdate kiel la 63-a UK, en 1978-07-30, en urbo Wuhan, alportis veran surpriz-ĝojon. UEA publikigis la koncernajn fotojn sur kovrilo de sia organo esperanto (n-ro 2/1979) kun aklama titolo : **Ĉinoj revenas !**

<146>

Akrostiko

— laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo

Anoncas

Grupo Kantona

Al ni novan prosperon.

Debuto verde sprona,

Uvo — fruktdona !

En junio 1998 venis el suda Ĉinio ĝoja novaĵo :la esperantistoj de Kantono decidis regule okazigi la "Agadan Tagon", por kune altigi la lingvan nivelon kaj por vigligi la lokan E-movadon. Surbaze de tiu aktivado, ili eldonis novan revueton nomatan "AGADU".

<147><148>

§. Guozhu 2007-1-17 上午 03:48:17

En du monatoj 两月间

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo 双语双调忆江南

Disfloras 中国风

du cent poemoj 喜见两百篇

en ĝardeno ĉineska. 同志同心同努力

Dank' al verdaj agemoj 中诗入世俱欣然

fruktas la gemoj. 开在百花园

Alies 有些人

nesamaj ŝatoj: 爱好另一般

diskutoj kaj disputoj, 争论争议无休止

same en du monatoj--- 同样时光两月间

nul rezultatoj! 枉自付空谈!

<149>

Fierinda Rekordo 纪录世无匹

---laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo 双语忆江南

(2003-07-09)

Penseo 三色堇,

nun en kompleto 一百四十期!
de cent kvardek numeroj 欣闻全文都上网,
aperas en la reto--- 空前纪录世无匹。
venk' de stafeto. 中华再努力。

<150>

Rava Kunvojaĝo

— laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo

Nin ravas
sorĉa pejzaĝo
de Kokos-urbo, Xinglong,
blanksabla Yalong-plaĝo
dum kunvojaĝo!

Hainan en harmonio,
sorĉe belas la pejzaĝo:
Kokos-urbo, Xinglong, kaj Yalong-plaĝo.
Nin ravas ĉielranda kunvojaĝo.
Rekordas seminario !

2007-02-13

<151>-<153>

Sekve post mesaĝoj de Komencantino

Fabloj el
Ezopa Saĝo
jen aperas ĉineske

**dank' al via kuraĝo,
lerto, kaj saĝo.**

**Mi legas
en vera ĝuo.
Kaj la originalon
nun aldonas per gluo
kun asiduo.**

**Kompara
lego konstatas,
ke vi bone adaptis,
la versoj delikatas,
kaj ni tre ŝatas!**

(2007-03-06)

<154>-<156>

En Okulparo Pruda

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

**mirinde
konduto kruda
kulpas je amorveko
en okulparo pruda
virino nuda**

**ridinde
kiom timema**



en okulparo pruda
eĉ kreivo poema
tabue tema

veinde
ag' maltolera
en okulparo pruda
iĝis eĉ il' genera
loko danĝera
(2009-12-05)

<157>



Kia malico

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

**Veinde
reta polico.
Eĉ nomo de ŝtatestro
viciĝas en mallico.
Kia malico!**

Yijianmei

(Branĉo da Umefloro)

§.70 Yijianmei 一剪梅 Brancxo da Umefloro [2-60-6]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,44,744 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

<158> **Neĝo kaj Umefloro**

— laŭ ĉinesko Yijianmei

Neĝo kaj umefloro

diferencas

per valoro.

Ol umefloro neĝo

malpli sorĉas

je odoro.

Ol neĝo umefloro

malpli blankas

je koloro.

Vintre, ambaŭ plaĉas al

ni spektantoj

kun adoro.



Yiqin'e (Memoro pri Palaca

Knabino)

§.71 Yiqin'e 忆秦娥 Memoro pri Palaca Knabino [2-46-6]

ĉina fiksforma poemo de du strofoj po 5 versoj de 3,7,3*44 /

7,7,3*,44 silaboj, laŭ rimaranĝo aaA,xa / aaA,xa (x=senrima)

<159>

PINO EN NEĜO

— laŭ ĉinesko Yiqin'e

Neĝ' sen fin'
subpremas al verda pin'.
Verda pin'
staras rekte,
ne fleksis sin.

Kio plej imponas nin,
estas via pura sin',
pura sin'
kun spitema
nobla inklin'.



Yishaonian

(Rememoro pri Juneco)

§.72 Yishaonian 忆少年 Rememoro pri Juneco [2-46-5]

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 444,55/7,34,55
silaboj, laŭ rimarangô xxa,xa/ a,xa,xa (x=senrima)

<160>

K. Kalocsay

HELIKETO

— laŭ ĉinesko Yishaonian

**Heliketo !
Venu, venu
el la domo !
Vin vokas eta
amika homo.**

**Mi venis kun bombono,
vinbero
kun aromo,
bongusta piro
kaj ruĝa pomo.**

Adaptita de Guozhu laŭ Streĉita
Kordo p.86.K. Kalocsay (1891-1976)

Yiwangsun

(Rememoro pri Princido)

§.73 Yiwangsun 忆王孙 Rememoro pri Princido [1-31-5]
ĉina fikforma poemo el 5 versoj de 7,7,7,3,7 silaboj, kun kontinua
rimo.

<161>

Umefloro

— laŭ ĉinesko Yiwangsun

**La ruĝa umefloro
spite al frostrigoro
floris en la vintrhoru.
Ho gloro!
Premios ĝin adoro!**

<161-2>

Al Sceto

— laŭ ĉinesko Yiwangsun
(2006-08-20)

**En multaj tagoj post via foriro,
mi ofte dronis en forta sopiro.
Facile trompiĝis revid-aspiro.
Portu al vi zefiro
versparon kun nasktaga bondeziro:**

忆王孙

(2006-08-20)

动若参商几经年，
云树情深满心间，
别时容易见时难。
思万千，
又当生日寄贺联：

**Yongyuyue (Ĉiama Ĝojo de
Renkontiĝo)**

§.74 Yongyuyue 永遇乐 Ĉiama ĝojo de renkontiĝo [2-104-8]
ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de
444,445,446,346/ 446,445,446,344 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,
xxa, xxa (x=senrima)

<162>

Plena Sun-eklipso

— laŭ ĉinesko Yongyuyue

**Por publiko/ surprizĝoja/ sensacio,
en du-mil naŭ,/ festeno de/ astronomio.
Sun-eklipso/ plena kaj en/ larĝa dimensio
okazas/ du-dek duan,/ ĉe ni en julio.**

**Televido/ disvidigas/ rekte el Ĉinio.
Imponas la/ fenomeno/ kvazaŭ magio.
Ses minutoj/ da noktiĝa/ tagiĝa vario.
Eterne/ memorinda/ emocio**

versis Guozhu 2009-07-22


Yugezi (Fiŝista Kanto)

§.75 Yugezi 渔歌子 Fiŝista Kanto [1-27-4] 7,7,33,7
ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimaranĝo
a,a,xa,a (x=senrima)

<163>

Ravo en neĝa nokto

— laŭ ĉinesko Yugezi
**Post la pordo fermita
lin ravas lego spita,
video
koita,
libro malpermesita.**



Yujia'ao (Fiŝista Fiero)

§.76 Yujia'ao 渔家傲 Fiŝista Fiero [2-62-10]

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,7,7,3,7, silaboj,
kun kontinua rimo.

<164>

AI CRI

Jubileo safira, Gratulo admira

— laŭ ĉinesko Yujia'ao
(2009-12-19)

**Esperanta elsendo ---
Kunlabora ĉarpento
dank' al la diligento
talento
fariĝis monumento.**

**Okaze de l' momento,
jubilea evento,
varma gratul-prezento:
Taĉmento,
al nova glor' ascendo!**

Yujiexing (promeno sur palaca strato)

§.77 Yujiexing 御街行 Promeno sur Palaca Strato [2-78-8]
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po ok versoj de 7,33,76,445
silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x=senrima).
<165>

Abolita Ĉefurbo

— laŭ ĉinesko Yujiexing

**Prohib' oficiala
pro kaŭzo
morala.
Abolita Ĉefurbo
al sorto fatala:
Fama libro
tuj fariĝis
roman' skandala.**

Sed premio reala



**al aŭtor'
lojala.
Abolita Ĉefurbo
revenas formala,
dank' al ŝanĝoj
de tempo kaj
norm' nesamskala.**

御街行・废都解禁

<废都>正式被查禁，
为道德、之原因。
火爆三月风云变，
犯忌讳被叫停，
横空出世，戛然而止，作者陷污名。

墙内开花墙外香，
费米娜，大奖评。
得奖不能提书名。
十七年终解禁，
新版首发，作者签售，热烈受欢迎。

<166>

Nokta Vojaĝo en Perla Rivero

— laŭ ĉinesko Yujiexing

En la Perla Rivero.

Agrabla

vetero.

Vojaĝas ni ekskurse

en ĉarma vespero.

Ambaŭborde

sorĉe brilas

lampofedero.

Saturas en aero

sentebla

prospero.

Progresas tag' post tagoj

la sankta afero.

Diligente

ni fosu kun

verda espero.



Yulinling (Tintado en Pluvo)

§.78 Yulinling 雨霖铃 Tintado en Pluvo [2-103-10]

ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive
de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo

a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

<167>

Tintado en Pluvo

— laŭ ĉinesko Yulinling

Ĉirpa plendo.

Eksterurba

okcidento.

Post drasta ekpluvo,

malheliĝas

firmamento.

Vualas krepuska

nebul-etendo.

La ŝipo

ekveturos.

Bedaŭra karul-sendo.

Ĉiam, de prajarcento,

doloras

disiĝ-turmento.

Kion pliigas la

aŭtuna

trist-momento!

Mi vekiĝos

kie?

En matena vento,

ĉe bordo



**salika, sub
sinka krescento.**

Yumeiren (Belulino Yu)

§.79 Yumeiren 虞美人 Belulino Yu [2-56-8]

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,5; 7,9; /
7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

<168>

Bizara Celebro

— laŭ ĉinesko Belulino Yu

**Celebro post balotoj
per nudaj fotoj.
Juna varieteo
kun originala ideo.**

**Retanaj amikinoj
kun korinklinoj,
en libera plezuro,
reve al pli bona futuro!**

<169>

☆ **Al Arka**

— laŭ ĉinesko Belulino Yu
Arka faris diskurson,

**kaj fondis kurson.
Samideanoj laŭdas,
sed maliculoj malaplaŭdas.**

**Ĉiam aperas fuŝo,
el hunda buŝo.**

**Proverba leciono:
Al fripono trafu bastono!**

<170>

Kalman Kalocsay (1891- 1976)

LA AMO

**La am' ne estas ludo,
sed sorta trud'.
Ĝi svingas sian vipon
forte al lip' pelante lipon.**

**Ni timas ĝian baton,
kaj senkompaton.
Sub ĝia jug' ni svenas,
sed tamen ĝin ni kore benas.**

Adaptita de Guozhu laŭ **Streĉita Kordo** p.76.

<171>

Al Shi Chengtai,

kiu esperantigis poemojn de Li He kaj Li Qingzhao tiam
— laŭ ĉinesko Belulino Yu

**Babilis ni letere
vere libere.
Niaj ŝatataj temoj
estas poetoj kaj poemoj;**

**Pli Li He sur azeno,
pri Sudĝardeno;
Pri Li Qingzhao talenta,
la poetino eminenta...**

<172> § .79-04

ĈENTONO

— ties fonto el Esperanto Antologio, p. 257 k.259

**Sur trista voj' pilgrima
kaj fund' anima,
mi vagas kun revemo
kaj min ektordas sufokpremo.**

**En posttagmez' fruhora
vi staris sola.**

**Langvore revas floroj
pri adiaŭ, disigaj horoj.**

<173>

§ .79-05

RENKONTE AL NOVA JARMILO

Venas nova jarmilo,

**ĝojas jubilo !
en la novjara tago
ekstartu maratona ago —**

**Ascendu al la reto
traduk-kompleto !
Ni, post longa laboro,
atingos la celon en gloro !**

Zhegutian (Pedrika Ĉielo)

§.80 Zhegutian 鸚鵡天 Perdrika Ĉielo [2-55-6]

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de
7,7,77 / 33,7,77 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)
<174>

Hardite

— laŭ ĉinesko Zhegutian
**Post kiam pluv' nin lavis,
hardite ni pli bravis.
Ne ĉiam daŭros ŝtormo.
Al sortbat' ni ne sklavis.
Survoje,
se kavis,
por ni tio ne gravis.
Neniam haltu marŝo.
Revidoj jam nin ravis.**

<175>

Multimedia Poštmarko

— laŭ ĉinesko Zhegutian*

(2009-09-13)

Informo sensacia.

Poštmarko multimedia

pri <Tricent Tang-poemoj>.

Raraĵ' filatelie.

En formo

gracia,

tekniko plurmetia.

Hodiaŭ inaŭguras

solen' ceremonia.

鸕鹚天·多媒体邮票

(2009-09-13)

喜迎国庆六十年，

邮票献礼竞新鲜，

取材唐诗三百首，

万里挑一选六篇。


多媒体，

微缩镌，

视听闻触功能全。

廿七城市同首发，

小词记胜鸕鹚天。



<176>

AKROSTIKA RIMGRATULO

al kara Magda Lena

— laŭ ĉinesko Zhegutian (perdrika ĉielo)

**Magda Lena plej kara,
Al mi kvazaŭ najbara,
Guozhu gratulas kore
De Ĉinio transmara**

**Al vi pro
La rara
Event' neordinara
(Nasktagon Ĝojan!) per la
Akrostiko memfara!**



Zhuyingtaijin (Kanto pri Zhu
Yingtai)

§.81 Zhuyingtaijin 祝英台近 Kanto pri Zhu Yingtai [2-77-7]
ĉina fikforma poemo el du strofoj po 9 versoj kaj 5 versoj de
335,45,6434/3,65,45,6434 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xa,xxxx/
a,xa,xa,xxxx (x = senrima).

<177>

La Unua Ekrigardo

— laŭ ĉinesko Zhuyingtaijin

**Eterne/ daŭras la/ memor' parkera.
Via figur'/ ĉe mi apera,
kiel preterfluga/ feino en/ vizio /efemera,
leĝera,
renkontebla nur en/ fabel' mistera.
Ĉarmas via/ voĉo tenera.
Sorĉite mi iĝis/ amrivera/ droninto/ mallibera.**



Zhuzhici (Bambuoj)

§.82 Zhuzhici 竹枝词 Bambuoj [1-28-3]

Ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo
a,a,xa (x=senrima)

<178>

Memore

— laŭ ĉinesko Zhuzhici

**Sidante antaŭ floroj,
mi dronas en memoroj.
Kiel tikle dolĉiĝas
la karaj verdaj horoj!**

Zuihuajian

(Ebrio inter Floroj)

§.83 Zuihuajian 醉花间 Ebrio inter Floroj [2-41-6]

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 4 versoj respektive de
3,3,5,55 / 5,5,55 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa / a,a,xa (x=senrima)

<179>

Sensacia Venko

— laŭ ĉinesko Zuihuajian

Julio.

Francio.

Futbal-pasio

Ŝot'! Venk' finala.

Ho,sensacio !

Sekvas premio



**kaj ovacio.
Ĉiuj dronas en
rava ebrio.**

Zuihuayin

(Ebrio sub Ombro de Floroj)

§.84 Zuihuayin 醉花荫 Ebrio sub Ombro de Floroj [2-52-6]
Ĉina fiksforna poemo el du samaj strofoj de 7,5,545 silaboj, laŭ
rimaranĝo a,a,xxa (x=senrima)

<180>

Natura Belo

— laŭ ĉinesko Zuihuayin
**Revenas primavero
post vintra gelo.
Sur kampo ĉie/ birdaj kantoj/ kaj neĝdegelo.**

**Serenas la ĉielo.
Viglas akvŝvelo.
Nun ebriige/ nin ravas la/ natura belo.**

84 ĉineskaj skemoj laŭ alfabeto vico

- 01 Busuanzi 卜算子 [2-44-4] (55,75)x2
02 Caisangzi 采桑子 [2-44-6] (74,4,7)x2
03 Chaitoufeng 钗头凤 [2-60-14] (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2 |
aaa;bbxbbBB
04 Chang-xiangsi 长相思 [2-36-8] (3,3,7,5)x2
05 Chaozhongcuo 朝中措 [2-48-5] 7,5,66/444,66
06 Daolianzi 捣练子 [1-27-3] 33,7,77
07 Dianjiangchun 点绛唇 [2-41-7] 47,4,5/45,34,5
08 Dielianhua 蝶恋花 [2-60-8] (7,45,7,7)x2
09 Dingfengbo 定风波 [2-62-11] 7,7;7,2;7;/7,2;7;2;7 | aabba/
ccdeed
10 Faqu Xian Xianyin 法曲献仙音 [2-92-9] 446,446,65/
3,34,36,534,434,56
11 Fendieer 粉蝶儿 [2-72-8] (10,34,334,36)x2
12 Fengrusong 风入松 [2-76-8] 7,5,734,66/7,5,77,66
13 Genglouzi 更漏子 [2-46-8] 33,6;33,5;/33,6;33,5 | xaa;xbb/
xcc;xdd
14 Guizhixiang 桂枝香 [2-101-10] 4,54,64,734,444/
7,54,64,734,444
15 Haoshijin 好事近 [2-45-4] 56,65/75,65
16 Heshengchao 贺圣朝 [2-49-6] 7,5,75/44,5,75
17 Hexinlang 贺新郎 [2-116-12] 5,344,76,7,78,33/
7,344,76,34,78,33
18 Heyebei 荷叶杯 [1-23-6] 6,2;3;7,2;3 | aab ccb
19 Huanxisha 浣溪纱 [2-42-5] 7,7,7/77,7
20 Jiangchengzi 江城子 [2-70-10] (7,3,3,45,733)x2
21 Jiangnanchun 江南春 [1-30-3] 33,55,77

- 22 Jianzi Mulanhua 减字木兰花 [2-44-8] 4,7;4,7;/4,7;4,7
- 23 Ku-xiangsi 酷相思 [2-64-10] (7,33,8,33,33)x2
- 24 Langtaosha 浪淘沙 [2-54-8] (5,4,7,74)x2
- 25 Linjiang-xian 临江仙 [2-56-6] (66,7,55)x2
- 26 Litingyan 离亭燕 [2-76-8] (66,76,56)x2
- 27 Manjianghong 满江红 [2-93-9] 434,344,77,353/
33,33,54,77,353
- 28 Mantingfang 满庭芳 [2-95-9] 446,45,634,345/
2,344,54,634,345
- 29 Moyuer 摸鱼儿 [2-116-13] 346,76,3,37,4,545/
36,6,76,3,37,4,545
- 30 Nangezi 南歌子 [1-23-3] 55,7,9
- 31 Nanxiangzi 南乡子 [2-56-8] (5,7,72,7)x2
- 32 Niannujiao 念奴娇 [2-100-8] 436,436,445,46/654,436,454,46
- 33 Pozhenzi 破阵子 [2-62-6] (66,77,5)x2
- 34 Pusaman 菩萨蛮 [2-44-8] 7,7;5,5/5,5;55 |aa bb cc dd
- 35 Qingpingyue 清平乐 [2-47-7] 4,5,7,7;/6,6,66 |aaaa bbxb
- 36 Qingyu' an 青玉案 [2-68-8] (7,33,7,445)x2
- 37 Qinyuanchun 沁园春 [2-114-9] 444,5444,447,354/
6,35,5444,447,354
- 38 Queqiaoxian 鹊桥仙 [2-56-4] (446,734)x2
- 39 Renyueyuan 人月圆 [2-48-4] 75,444/444,444
- 40 Ruanlanggui 阮郎归 [2-47-8] 7,5,7,5/33,5,7,5
- 41 Rumengling 如梦令 [1-33-5] 6,6,56,2,2*,6
- 42 Santaici 三台词 [1-24-2] 66,66
- 43 Shanhuazi 山花子 [2-48-5] 7,7,73/77,73
- 44 Shaonianyou 少年游 [2-50-5] 7,5,445/75,445
- 45 Shengshengman 声声慢 [2-97-10] 4,46,64,634,336/

- 6,36,46,634,37
- 46 Shengzhazi 生查子 [2-40-4] (55,55)x2
- 47 Shiliuziling 十六字令 [1-16-3] 1,7,35
- 48 Shuidiaogetou 水调歌头 [2-95-8] 55,65,665,55/333,47,665,55
- 49 Shuilongyin 水龙吟 [2-102-9] 67,444,444,5433/
6,34,444,444,544
- 50 Siyuanren 思远人 [2-51-5] 75,445/7,5,545
- 51 Sumuzhe 苏幕遮 [2-62-8] (33,45,7,45)x2
- 52 Suzhongqing 诉衷情 [2-44-6] 7,5,65/33,3,444
- 53 Taichangyin 太常引 [2-49-7] 7,5,5,34/445,5,34
- 54 Tasuoxing 踏莎行 [2-58-6] (44,7,77)x2
- 55 Taoyuan Yiguren 桃园忆故人 [2-48-8] (7,6,6,5)x2
- 56 Tianjinsha 天净沙 [1-28-5] 6,6,6,4,6
- 57 Tianxianzi 天仙子 [1-34-5] 7,7,73,3,7
- 58 Tiaoxiaoling 调笑令 [1-32-6] 2,2*,6;6,6;2**,2*,6 | aAa bb cCc
- 59 Wanghaichao 望海潮 [2-107-11] 446,446,5,54,47/
6,54,446,5,54,47
- 60 Xiangjianhuan 相见欢 [2-36-7] 6,3,9;/3,3;3,9 | aaa bb aa
- 61 Xiaocongshan 小重山 [2-58-8] 7,53,7,35/5,53,7,35
- 62 Xiaomeihua 小梅花 [2-114-22] (3,3,7;3,3,9;/7,7;3,3,9)x2 |(aaa
bbb cc ddd)x2
- 63 Xiaoxiangshen 潇湘神 [1-27-3] 3,3*,7,77 |aAaxa
- 64 Xiechichun 谢池春 [2-66-8] (46,34,45,34)x2
- 65 Xijiangyue 西江月 [2-50-6] (66,7,6)x2
- 66 Yanermei 眼儿媚 [2-48-5] 7,5,444/75,444
- 67 Yejinmen 谒金门 [2-45-8] 3,6,7,5/6,6,7,5
- 68 Yexingchuan 夜行船 [2-56-6] (7,34,446)x2
- 69 Yijiangan 忆江南 [1-27-3] 35,77,5

- 70 Yijianmei 一剪梅 [2-60-6] (7,44,744)x2
 71 Yiqin'e 忆秦娥 [2-46-6] 3,7,3*,44/7,7,3*,44 | aaA xa/ aaA xa
 72 Yishaonian 忆少年 [2-46-5] 444,55/7,34,55
 73 Yiwangsun 忆王孙 [1-31-5] 7,7,7,3,7
 74 Yongyuyue 永遇乐 [2-104-8] 444,445,446,346/
 446,445,446,344
 75 Yugezi 渔歌子 [1-27-4] 7,7,33,7
 76 Yujia'ao 渔家傲 [2-62-10] (7,7,7,3,7)x2
 77 Yujiexing 御街行 [2-78-8] (7,33,76,445)x2
 78 Yulinling 雨霖铃 [2-103-10] 4,44,644,65,347/
 7,35,634,426,345
 79 Yumeiren 虞美人 [2-56-8] 7,5;7,9;/7,5;7,9 | aa bb/ cc dd
 80 Zhegutian 鹧鸪天 [2-55-6] 7,7,77/33,7,77
 81 Zhuyingtaijin 祝英台近 [2-77-7] 335,45,6434/3,65,45,6434
 82 Zhuzhici 竹枝词 [1-28-3] 7,7,77
 83 Zuihuajian 醉花间 [2-41-6] 3,3,5,55/5,5,55
 84 Zuihuayin 醉花荫 [2-52-6] (7,5,545)x2

Klarigo:

Ekzemple : 84 Zuihuayin 醉花荫 [2-52-6] (7,5,545)x2

84: vicnumero

Zuihuayin: nomo de ĉinesko en HFA

醉花荫: originala nomo en la ĉinaj ideogramoj

2: nombro de strofo(j)

52: nombro de silaboj

6: nombro de rimoj

Signoj pri fiksformo (7,5,545)x2